

## La Dorlotbestoj

preparis Leston Buell

### 1. Demandoj

1. Ĉu vi havas dorlotbeston en via hejmo nuntempe? Kian?
2. Ĉu vi havis dorlotbestojn dum via infanaĝo? Kiajn?
3. Kiuj estas la plej popularaj dorlotbestoj?
4. Ĉiu speco de dorlotbesto havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Cetere, oni zorgas ĉiun specon laŭ malsama maniero. Elektu specon de dorlotbesto kaj ekspliku kiel oni vartas kaj zorgas ĝin. Menciu ankaŭ ĝiajn avantaĝojn kaj malvantaĝojn. Jen kelkaj bestoj, pri kiuj oni parolu: hundo, kato, fiŝeto, ĉevalo, papago.
5. Kelkaj bestospecoj taŭgas kaj kiel dorlotbestoj kaj por manĝaĵo, eĉ en sama kulturo, ekz. kunikloj kaj ĉevaloj. En kelkaj landoj, oni manĝas ankaŭ hundaĵojn. Kiel la homaro elektas kiajn bestojn taŭgas por manĝi kaj kiajn taŭgas por amikeco? Kiel la homo kapablas kaj havi bestajn amikojn kaj manĝi viandon?
6. La mistraktado de kelkaj bestoj (kiel ekz. hundoj) estas punebla krimo, sed samtempe, la mortigo de aliaj bestoj (ekz. ratoj) ne estas kontraŭleĝa, eĉ se la mortigmaniero estas tre kruela. Kiel la socio samtempe kredas je la rajtoj de kelkaj specioj kaj akceptas mistraktadon de aliaj?
7. Kiuj estas la similecoj kaj diferencoj inter rilato kun homa amiko kaj rilato kun besta amiko? Inter rilatoj kun gefiloj kaj rilatoj kun dorlotbestoj?
8. Ekzistas en la mondo diversaj ŝarĝobestoj, ekz. ĉevaloj, azenoj, muloj, kameloj, kaj elefantoj. Rankontu viajn proprajn spertojn kun tiuj.
9. En Usono, populara kredo ekzistas, ke viroj emas preferi hundojn, dum la virinoj emas preferi katojn. Ekspliku vian propran opinion. Ĉu estas vere aŭ ne? Kia estas la rilato inter la personaj karakterizoj de homo kaj la speco de besto, kiun li elektas?
10. Kelkaj personoj elektas tre nekutimajn dorlotbestojn. Pri kiuj tiaj vi iam aŭdis? Kiujn vi eĉ vidis proprokule?

## 2. Utilaj Vortoj

dorlotbesto: *pet*

hundo

rashundo: *dog of a particular breed (that is, the opposite of a mutt)*

kato

birdo

fiŝo

serpento

kuniklo

ĉevalo

hamstro: *hamster*

kobajo: *guinea pig*

testudo: *turtle*

papago: *parrot*

kanario: *canary*

besto, animalo, kreitaĵo, viv(ant)aĵo,  
estulo

bestio

kaĝo: *cage*

furaĝo

dorloti: *to pamper*

brede: *to breed*

dresi: *to train (an animal)*

kultivi: *to raise (animals)*

flegi: *to nurse, care for (a sick person)*

promenigi

varti: *to care for (especially a child or a young animal)*

karesi

grati: *to scratch*

rampi: *to crawl*

sekskuniĝi: *to mate*

feki, kaki

vosto: *tail*

piedo: *paw*

naĝilo: *fin*

branko: *gill*

suĉi: *to suck*

leki: *to lick*

en oestro, seksarda: *in heat*

kuri

rajdi

salti: *to jump*

katsablujo: *litter box*

miaŭi: *to meow*

boji: *to bark*

ronroni: *to purr*

sino: *lap*

ŝpruci: *to spray*

lukti: *to fight*

lektrinki: *to lap up*

scivolema: *curious*

felo: *fur*

skvamoj: *scales*

ungego: *claw*

vanĝaro: *whisker*

plumo: *feather*

brosi: *to brush*  
bani: *to bathe*

artifiko: *trick*

### 3. Ekzercoj

#### Ekzerco 1

Ni praktikos la uzadon de kelkaj el la Utilaj Vortoj. Metu taŭgan formon de taŭga vorto en ĉiun frazon.

dorloti  
dresi  
boji  
karesi

grati  
rampi  
bredi  
salti

varti  
ronroni

1. La serpentoj \_\_\_\_\_ sur la grundo.
2. Se oni tro \_\_\_\_\_ sian infanon, ĝi havos malbonan kaj malfacilan karakteron kiam ĝi maturiĝos.
3. Dum tiu virino laboras dum la tago, ŝia najbaro \_\_\_\_\_ ŝian bebon.
4. La hundoj laŭte \_\_\_\_\_, vekante la tutan vilaĝon.
5. La granda hundo \_\_\_\_\_ subite en la sinon de sia mastrino.
6. Se vi deziras ovojn vere freŝajn, vi devas \_\_\_\_\_ viajn proprajn kokinojn.
7. Mi \_\_\_\_\_ mian hundon tiel, ke ĝi alportas al mi la gazeton ĉiun matenon el la ĝardeno.
8. Estas interese, ke en la araba lingvo, kiam kontenta kato \_\_\_\_\_, oni diras, ke ĝi preĝas aŭ ke ĝi recitas koranajn versiklojn.
9. Tiu ĉevalo verŝajne deziras, ke vi \_\_\_\_\_ ĝin malantaŭ ĝiaj oreloj.
10. Estas plaĉe \_\_\_\_\_ katon, ĉar ĝia felo estas glata.

## Ekzerco 2

Nun ni praktikos la uzadon de la sufikso *-ig*. Metu taŭgan formon de taŭga vorto en ĉiun frazon.

boli, boligi  
scii, sciigi

promeni, promenigi  
sidi, sidigi

plori, plorigi  
morti, mortigi

1. Mi forgesis la supon, kiu dum horo \_\_\_\_\_ sur la fornelo.
2. Se mi ne \_\_\_\_\_ la hundon sufiĉe ofte, ĝi kakas en la domo.
3. La knabino \_\_\_\_\_, kiam ŝia glaciaĵo renversiĝis sur la ŝoseon.
4. Mi deziras \_\_\_\_\_ vin, pri mia baldaŭa edziĝo.
5. Por prepari teon, necesas \_\_\_\_\_ akvon.
6. La instruisto ne \_\_\_\_\_, kiel respondi tiun neklaran demandon.
7. La vartistino \_\_\_\_\_ en angulo dum horo kun la suĉinfano.
8. Estas tre agrable \_\_\_\_\_ laŭ tiu bulvardo.
9. Ŝajnas, ke la ideo de milito neniam \_\_\_\_\_.
10. La memoro de la brutala perforto \_\_\_\_\_ la knabeton.
11. Mi \_\_\_\_\_ la laciĝintineton sur mian sinon.
12. Tiu kuracilo \_\_\_\_\_ la malbonajn bakteriojn en via stomako.

### Ekzerco 3

Nun ni daŭrigas la praktikadon de la sufikso *-ig*. Metu taŭgan formon de taŭga vorto en ĉiun frazon.

soifi, soifigi  
dormi, dormigi

ridi, ridigi  
stari, starigi

kreski, kreskigi  
bruli, bruligi

1. La lerta ŝerco \_\_\_\_\_ nin ĉiujn.
2. Anglalingva proverbo konsilas ne vekigi \_\_\_\_\_ hundojn.
3. La fotisto \_\_\_\_\_ la fototojn unu apud la alia.
4. La incendio \_\_\_\_\_ plurajn lojojn.
5. Kiam vi luprenas monon, vi \_\_\_\_\_ viajn ŝuldojn.
6. \_\_\_\_\_ estas pli agrable ol plori.
7. La salo \_\_\_\_\_ nin.
8. Arda flamo \_\_\_\_\_ en mia koro.
9. La dresisto \_\_\_\_\_ apud sia ĉevalo.
10. Mi \_\_\_\_\_ la knabeton en lia propra lito.
11. Se vi faros nenion, la problemo nur \_\_\_\_\_.
12. Se mi ne trinkos sufiĉe da likvo nun, mi certe \_\_\_\_\_ dum la vojaĝo.

#### 4. Lingvaj Rimarkoj

speco, specio

speco: *kind, type*

specio: *species*

animalo, besto, bestio

animalo: Kolektiva nomo de bestoj kaj homoj.

besto: 1. Ĉiu animalo escepte de homo. 2. (fam.) Homo stulta aŭ kruda kiel besto.

bestio: 1. Sovaĝbesto. 2. Sovaĝinstinkta senbride perfortema homo: *la naziaj bestioj*. → brutalo

felo, pelto

felo: Kruda bestas haŭto kun la haroj, ordinare ne preparita.

pelto: 1. Speciale preparita felo, ordinare belhara aŭ harriĉa uzata por fari veston, garnituron, kaj simile. 2. = peltaĵo.

peltaĵo: Vesto el pelto.

ekskrementi, feki, kaki

Ŝajnas, ke *ekstrementi* kaj *kaki* estas vortoj pli decaj ol *feki*. *Fek!* estas interjekcio de kolero, malestimo, indigno, malbonŝanco, kaj simile. (Komparu kun *diable!* kaj *damne!*) *Fekulo* estas fihomo. Rilate al *kaki*, la *Hejma Vortaro* difinas ĝin kiel « Ĉiutaga, hejma vorto por *feki* » kaj tradukas ĝin anglan per *go poo-poo*. Ekzistas ankaŭ *merdo*.

varti

Gardi kaj prizorgi estulon, kiu bezonas helpon pro sia juneco, nefortikeco: *varti bebon, hundeton*.

## El Kiel diri...?

Jen kelkaj vortoj, esprimoj kaj proverboj adaptitaj el la sekcio *Bestoj* de la frazeologia libro *Kiel diri...?*

Ne turmentu bestojn.

HUNDO bojas, jelpas, « hojlas », hurlas.

Hundoj terure hurlis, kvazaŭ morton antaŭflaris.

Hundo libera, ĉenita.

Hunda raso, vivo. (hunda = mizera)

Azilo por perditaj hundoj.

Hundo bojas, homo vojas.

Bojanta hundo ne mordas. (Ne timu bojantan hundon.)

Bojas hundido, ĉar tiel faras hundo.

Por hundon dronigi, oni nomas ĝin rabia.

Al hundo ja « licas » rigardi episkopon.<sup>1</sup>

La lastan el la amaso la hundo atakas.

Elpeli iun kiel favan hundon.<sup>2</sup>

Luphundo. Levrelo. Spanielo. Vertago. Pudelo. Danhundo. Grifono. Spurhundo.

Buldogo. Mopso. Miksrasa hundo.

KATO miaŭas, kraĉospiras, ĝibigas la dorson, buliĝas, ŝpinas<sup>3</sup> (« ronronas »), faras velurpedon.

Ekskato.<sup>4</sup> Domedukita kata. Tegmentleporo (slanga nomo de migra kato).

Ne karesi la katojn kuspe, kontraŭ la haroj.<sup>5</sup>

Fali ĉiam plandalsube kiel kato.

Kontentigi la katon kaj kune la raton.

Danci kiel kato ĉirkaŭ la poto.

Botvestita kato.

Kiam la katoj promenas, la musoj festenas.

---

1 La signifo de ĉi tiu frazo estas por mi mistero.

2 Laŭ PIV, ĉi tia uzado de la vorto *fava* estas evitinda. La ĝusta vorto estus *skabia*. *Favo* estas malsano de la homa kaphaŭto (simila al la angla *ringworm*), dum *skabio* (angle *mange*) estas haŭta malsano, ofta ĉe hundoj, kiu kaŭzas fortan jukadon.

3 Mi dubis pri la ĝusteco de *ŝpini*, sed Zamenhof uzis ĝin tiel.

4 Alia mistero.

5 Kuspi: Klini aŭ faldi ion kontraŭ la natura direkto: *kuspi la harojn de kato, li kuspis al mi la jupon ĝis la talio, la malvarmo kuspas la foliojn*. Kuspe: Laŭ kontraŭnormala direkto: *kuspe faldi manikojn; brosi kuspe ĉapelon, veluron*.